Södra Distriktet av SEF planerar en veckoslutskurs i oktober eller början av november och dessutom planeras ett 1-dags seminarium kring Esperantos historia och äldre författare.

Vidare upplysningar lämnas av Bertil Andréasson, Södra Rörum. 242 00 Hörby, tel 0415-501 52

NÄRRADIO-PROGRAM EFTERLYSES!

Falköpings Esperantoklubb vill ha hjälp med program till sina sändningar i Falköpings närradio. Programmen skall vara intressanta för lyssnarna i synnerhet i Falköping med omnejd. De kan behandla nyttan och nöjet av att kunna Esperanto och de bör inte vara mer än ca 15 min långa varav högst 5 min sång och musik.

Förslag kan sändas till Falköpings Esperantoklubb Granelundsgatan 7 C 521 00 Falköping



TEDU-regionen

Juni månad inleddes med att östgötaklubbarna hade en intressant och lärorik, "verksamhetsavslutning" för säsongen i Västerby skogsvårdsskola, där ett 30-tal esperantister njöt av en intressant skogsvandring och lärde sig skogsvård både i Sverige och i Afghanistan. Det sista lärde en SIDA-konsult ut. Han är nu chef på Västerby.

Sommarverksamheten inom TEDU kommer bli att bestå av en lärarträff där regionens esperantolärare ska diskutera vad man kan och bör göra i skolorna. Kerstin Rydén håller i den. Kumlabyskola i Kumla kommer till hösten att ha esperanto som Fri Aktivitet.

I slutet av september kommer vi att samla studiehandedare till en diskussion i Norrköping. Haldo Vedin bjuder in till den träffen.

Kerstin Rohdin



Östgötska esperantoklubbarna med gäster från Örebro och Skövde hade sedvanligt gemensamt möte i juni.

ESPERANTO PÅ FN:S ÅRSMÖTE

Sista helgen i maj hade Svenska FN-förbundet sitt årsmöte i Katrineholm. Jag hade förmånen att representera SEF men jag var inte ensam esperantist. Från Norrköpings och Karlskogas FN-föreningar kom Haldo Vedin respektive Torbjörn Löfblad. Till årsmötet hade Lunds FN-förening inlämnat en motion om esperanto. Då det skulle ta för stort utrymme att här återge hela motionen begränsar jag mig till slutraderna i den:

"Med hänsyn till vad som ovan anförts hemställer vi att FN-förbundets kongress måtte besluta att föreslå för FN:s generalför-samling

a t t genom UNESCO utarbeta en plan som globalt påskyndar undervisning av esperanto i obligatoriska skolor;

a t t snarast möjligt införa esperanto som officiellt språk i FN-systemet i syfte att skapa förutsättningar för en lösning av det växande språkproblemet."

Förbundsstyrelsen (FN-förbundets alltså) hade som brukligt

är behandlat motionen innan årsmötet. I yttrandet berörs bl a den studie om information och kommunikationsproblem som UNESCO presenterat 1980 ("Många röster - en värld"). Förbundsstyrelsen menade att uppgifterna i studien "ger ett entydigt besked om vilka konsekvenser språkproblemen har för kommunikationen mellan människor". Sedan kommer man in på hur viktigt det är att avskaffa analfabetismen i världen och menar här "att detta arbete inom UNESCO bör prioriteras innan större resurser tas i anspråk för att utveckla ett gemensamt världsspråk". Det viktigaste i ett sådant här yttrande är dock vad som sägs i den avslutande attsatsen och där står det så här:

"Årsmötet föreslås besluta att uttala sitt stöd för den fortsatta utvecklingen av esperanto som ett gemensamt språk vid sidan av det egna språket."

Alla motioner behandlades först i utskott precis som i riksdagen. Ingen av oss esperantister hade blivit placerade i det utskott,

som skulle behandla just den här motionen. Eftersom man kunde byta utskott så gjorde vi följaktligen detta alla tre. I utskottet rådde det faktiskt finnas en riktig motståndare till esperanto. Helst hade han visst velat avslå hela motionen, men det kunde han väl inte, tyckte han, när nu styrelsen tillstyrkt i sitt yttrande. Det hela avlöpte dock väl och även utskottet tillstyrkte utskottets förslag. Det klubbades senare igenom av hela årsmötet.

Som en extra krydda kan nämnas att Roland von Malmborg (trubaduren) skulle uppträda på eftermiddagen. Han hade precis återkommit från en längre resa i Östeuropa och kunde nu berätta för publiken vilken praktisk användning han haft av esperanto under resan. Att han också sjöng på esperanto blev ett helt naturligt inslag i hans program under årsmötet.

Åke Rohdin

La Esperanta klubo de Skövde aranĝos

SEMAJNFINA KURSO

1a 8:an kaj 9:an de septembro en Västerhöjdsolan.

Nivelejoj: komencanta, daŭriga kaj konversacia

Prezo 50 kronoj

Aliĝoj al: Erna 0500-189 77

Ernst 0500-154 64

HÄNG MED

RESA till Polen 1-16 september.

Vi ordnar en gruppresa till Ora Pola Aŭtuno. Resan utgår från Ystad. Kostnad för arrangemanget 1.600:-. Kostnad för resa och visum tillkommer och beror på hur många deltagare det blir.

Upplysningar och anmälan till Kerstin Rohdin senast den 14 augusti tel 019-23 63 45 kvällstid

Adress: Ålsta, 690 72 SKÖLLERSTA



IRANA ESPERANTISTO EN SVEDIO

politika rifuĝanto, 24-jara, venis al Svedio en majo kaj li volas havi kontakton kun svedaj esperantistoj. Lia adreso estas:

Meyari Hasein
Amsbyn (hus 17)
Box 98
342 00 Alvesta

KUN ESPERANTO EN SOVETUNIO

Veturi al Sovetunio estas ĉiam interesa kaj turistoj el la okcidentaj landoj venis tien en grandaj aroj. Sed por esperantistoj la vojaĝo estas vera travivaĵa, ĉar ili estas akceptataj de samideanoj, kiuj renkontas ilin kun amikeco kaj malavara gastemeco. Tio estas la ĉefa impreso kaj la plej agrabla memorajo por dudeko da svedaj esperantistoj, kiuj faris rondvojaĝon en la granda lando dum du semajnoj komence de Majo.

Iniciatinto de la vojaĝo estis Leon Salomonson kaj kelkaj aliaj membroj de la Esperantoklubo en Malmö. Tiu klubo adaptis la Esperantoklubon en la fora urbo Samarkand kiel amika klubo kaj tio estis instigo por profundigi la amikecon per personaj kontaktoj kaj vizito. Post anonco en La Espero la amika rondo pligrandiĝis per esperantistoj el la tuta lando de Trelleborg en la sudo ĝis Luleå en la nordo. Do 21 esperantistoj kolektiĝis en Stockholm por flugi al Moskva, kie ni tranoktis kaj tuj venontmatene daŭrigis al Erevan

en la sudo, tre proksime al la turka limo.

La esperantistoj en Erevan aranĝis gajan feston por ni kun naciaj kantoj kaj dancoj kaj specialaĵoj el Armenio por manĝi. Ekskurso kondukis nin al bela montaro, kie ni trovis malnovan templon el la greka periodo kaj interesan manaĝejon el la 12-a jarcento, konstruitan parte en la monto.

Sed la plej grava celo de nia intereso estis la fora orienta Centra Asio: Samarkand kaj Tasjkent. La "Ora Samarkand" estas fama pro la interesaj konstruaĵoj el la 15-a jarcento, la tempo de Timur Lenk.

La esperantistoj en Samarkand aranĝis agrablan vesperon kun muziko kun instrumentoj, specialaj por Uzbekistan kaj kantado de ĥoro el la muziklernejo. Ankaŭ en Tasjkent la esperantistoj invitis nin al gaja kunestado kaj aranĝis por ni belan ĝuindan orgenkoncerton. La unuarangan instrumen-

ton traktis lertege la rektorino de la muzika altlernejo.

La lastajn tagojn de la vojaĝo ni pasigis en Moskva kaj tie ni travivis la Tagon de la Paco, la 9-an de Majo. Estis impona kaj kortusa manifestacio kun vicaro post vicaro da homoj, kiuj preterpasis kaj metis florojn sur la tombo de la nekonata soldato ĉe la muro de Kreml dum la tuta tago. Ni svedoj ekhavis imagon pri tio, kio paco signifas por homoj, kiuj estas trafitaj de du militoj.

Ankaŭ en Moskva granda aro de esperantistoj akceptis nin. Ili rakontis pri sia laboro por Esperanto precipe inter gejunuloj kaj ili estis scivolemaj pri niaj agadoj en la okcidentaj landoj. Ni svedoj estis imponitaj renkonti tiom da lerte parolantaj gejunuloj en ĉiuj kvar lokoj, kiujn ni vizitis. Pro demando de juna ĉarma knabino ĉu la gejunuloj en Svedio fervore studas Esperanton, mi devis konfesi, ke la gejunuloj ne venas en tro grandaj aroj al la Esperantomovado en Svedio. Kun granda miro la knabino demandis: "Sed KIAL ili ne lernas Esperanton? Ĝi ja donas tiajn avantaĝojn!" Jes, gesvedoj, junaj kaj maljunaj! KIAL?! Ĉu vi ne scias pri la avantaĝoj?

Tiakaze veturu kun esperantistoj al foraj fremdaj landoj, renkontu samideanojn kaj ekhavu novajn amikojn! Tiam vi spertu mem la avantaĝojn de la Internacia Lingvo!

Linnea Edsenius

NOVA LIBRO

DET HÄR ÄR BOKKLUBBEN NOVA LIBRO

Ur bokfloden från hela världen väljer vi varje år ut 3-5 nya esperantoböcker. Det blir framför allt lättlästa böcker, noveller eller korta romaner.

Närmast kommer: Etulaj aventuroj (Zora Heide), La fermita urbo (Istvan Nemere).

Du får den utvalda boken hem till dig. Med varje bok följer ett inbetalningskort. Vill du behålla boken, betalar du inom 10 dagar. I annat fall skickar du tillbaka den inom 10 dagar i samma kuvert, så att vi ser att boken kommer från dig.

Om du vill, kan du sälja boken till någon annan.

I bokklubben betalar du ett lägre pris än vid enstaka beställning. Din kostnad per år kommer (i 1984 års priser) att vara omkring 300 kr.

Anmäl dig till

Bokklubben Nova Libro. Esperantoförlaget
Brunnsgatan 21. 111 38 Stockholm (fbv till Ulla Luin)



VENIS LETERO EL TAŝKENTO

Nia Komisiono regule ricevas vian organon kaj kun plezuro ni legas esperantan parton de la revuo. Ni dankas vian bonvolemon kaj, kiel rekompenson, ni sendas la jenan kontribuajon.

La ideon teorie kredi estas malfacile. Tamen vizitas nian esperantistan klubon interesiĝantoj pri la lingvo, iuj restas en la kursoj, iuj finas ilin, iuj fojfoje vizitas la kunvenojn, kie oni parolas nur Esperante. Ili praktikas, iom korespondas. Nia urbo estas tro fora kaj ne tiom multaj eksterlandanoj vizitas ĝin. Svedoj? Eble venas, sed laŭ kio ilin rekoni? Esperantistoj? Ili estas guteto en maro — unu-du dum jaro.

Kiam venis la telegramo de Leon Salomonson, ke al ni venos 21 svedaj esperantistoj, malmultaj kredis je ĝia realo. Sed kiu scias? Ni iom preparis nin por la renkonto.

Triopo el ni venis al la hotelo por esplori la aferon. Jen, estas vero, neimagebla vero — ĉe la enirejo staras grupo de eksterlandanoj (grupo!) — verdaj steloj sur la jakoj kaj... ni komprenas unu la alian. Ni verŝajne sentis kiel la partoprenantoj de la 1-a

UK. Ni miris, ni promenis tra la vespera Taŝkento, furiozis printempo kaj la koroj batis altaritme — ni vidas samtempe tiom multajn alilandajn (ne fremdlandajn!) samideanojn. Ni interparolis, konatiĝis, demandis, respondis, sentante grandan simpation al la svedoj, ni legis versojn de la taŝkenta E-poeto Anvar Zajsanov.

Poste estis paŭzo. Por Samarkando. La svedoj revenis. Kiel en fabelo, kiel en agrabla sonĝo pasis ekskursoj, vizito al Pionirpalaco, oficiala akcepto en la Amikecasocio, kantado de Esperantaj kantoj, vizito al la Konservatorio al koncerto de orgena muziko, brua ĉampan-vespero, longa adiaŭo.

Por multaj el ni la svedoj estis la unuaj alilandaj E-parolantoj. Multe efikis la renkontiĝo al la ĵus finintaj la kurson. Ili ekvidis utilon, uzeblecon de Esperanto, ili pruvis al si, ke ne estis vane perdataj tri monatoj, dum kiuj la lingvo estis studita.

La rezulto de la sveda vizito estis gravega por nia esperantoklubo. La lingvo estis uzata — tio estis aldono de la brulaĵo al la anima fajro. En la Pionirpalaco

dank'al konversacio kaj interpretado per Esperanto estis ricevita invito de E-instruisto (pagata) por la nove lanĉota E-kurso por infanoj. En la Amikecasocio sonis tiuvespere nur Esp-to — tio estis pruvo al la aŭtoritatulo pri uzebleco de la lingvo (ni tion pruvas al la mondo ĉ. 100 jarojn). En la konservatorio, kie okazis la koncerto de orgen-muziko, estis bone propagandita la lingvo kaj estas atendataj dezirantoj por studi ĝin ĉe la kurso inter la studentoj kaj profesoroj. Kaj plej grava estas tio, ke niaj amikaj sentoj al la sveda popolo, al ĝiaj reprezentantoj plifirmiĝis.

Una el la svedoj diris: Mi vidis Samarkandon, mi vidis Taŝkenton — mi povas morti. Ne, karuloj, vivu longe kaj re — kaj revenu al ni, venu kun viaj amikoj, kun viaj kamaradoj. Venu ne nur svedoj, venu norvegoj, ĉinoj, germanoj, francoj, italoj, usonanoj, venu hispanoj. Venu ĉiuj, kiuj deziras. Venu, parolu kun ni Esperante — ni konatiĝu, amikiĝu! Ni gardu la Pacon!

Venu..., sed avertu nin anticipe.

Prezidanto de la Taŝkenta esperantista klubo ĉe la Domo de sciencistoj

Eŭgeno S Perevertajlo

ILEI JARKONGRESO EN SVEDIO 1985

La Sveda Sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj jarkunvenis la 12-an de majo en Skövde.

En la jarraporto, kiu estis aprobata, staras ke la membronombro de la sekcio kreskis dum la jaro, sed ankoraŭ restas multaj esperantistaj geinstruistoj, kiuj estas ekster nia rondo. Ni devas plivigliĝi la varbadon. La jarraporto ankaŭ informis ke diversloke membroj gvidis kursojn por infanoj kaj en la lernejo kaj ekster la regulaj studhoroj.

La prezidanto reprezentis la

sekcion dum la 17-a Internacia Konferenco de I.L.E.I., kiu okazis en Sintra, Portugalio. La sekcio dum la jaro havis kontaktojn kun eksterlandaj instruistaj organizoj.

La jarkunsido reelektis kiel estraranoj Bertil Andreasson, Hörby, prezidanto; Ingemar Nordin, Stockholm; Ingrid Ottosson, Vällingby; Jan-Olof Ahlbeck, Vilhelmina kaj novelektis Lars-Börje Nilsson, Halmstad kiel kasisto post Karl-Erik Eriksson, Linköping, kiu eksciĝis. La jarkunveno pritraktis la malnovan statutproblemon de la Sveda Esperanto-

Instituto, kaj konstatis ke ankoraŭ ne la afero estas solvita. Espereble venonta jarkunsido povos meti punkton por la longedaŭra felietono.

La jarkunveno akceptis la proponon de la estraro organizi la venontjaran Internacian Konferencon de I.L.E.I. en Svedio. Ĝi okazos la 22-an-20-an de julio 1985 en Norda Populaltlernejo, Kungälv. La estraro petas ĉiujn helpemajn interesojn sin anonci al la prezidanto por ke ni povu organizi brilan internacian renkontiĝon de geinstruistoj 1985.

Bertil Andreasson

Recenzoj

Materada de Fulvio tomazzi. Edistudio, Pizo, 1983. 159 p.

Dum jardeko pli ol 200 000 homoj forlasis sian naskiĝlokon pro la divido de la triesta regiono inter Jugoslavio kaj Italio post la dua mondmilito. La italoj en la jugoslava parto havis eblecon elmigri Italion. Tio ĉefe okazis dum du limigitaj periodoj.

Tiu romano, tradukita de la itala, rakontas pri la pensoj de viro rilate eventualan elmigron. Ĝi rakontas pri la vivo en eta vilago – tre malsimila al la vivo kiun renkontis la multaj jugoslaviaj enmigrintoj ĉe ni. Kaj kompreneble la familiaj rilatoj, ĉefe al onklo, multe okupas la pensojn kaj vivon de la rakontanto.

Materade estas la unua verko de la aŭtoro, kiu poste gajnis plurajn premiojn pri sia verkado. Lia stilo estas, aŭ tiam estis, iom nepolurita, sed mi volonte legus tradukon de alia lia verko.

Anita Lindblom

Kiuj semas plorante, Eva Tofalvi kaj Oldrich Knichal. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 1984.

Tiu romano prilumas kelkajn de la problemoj, kiuj estis aktualaĵoj por la esperantomovado en granda parto de Eŭropo dum la tridekaj jaroj.

La intrigo prezentiĝas en Ĉeĥoslovakio kaj aperas pere de retrospektivaj pensoj de juna viro en mensa malsanulejo. Ni sekvas lin de infanaĝo kaj en rapsodiaj iluminadoj ni konatiĝas kun la homo. La tre speciala rolo de la rakontanto – ne nur rakontanto, sed aganto en dramo – estas metodo alproksimiĝi al kio okazis, kiu kaptas la leganton.

Mi ne volas malkovri ion pli, sed deziras al legontoj plezuron.

Aĉetebla ĉe EsperantoCentro. Prezo 60 kr.

Anita Lindblom

MENDU NOVAN Nekrologo LIBRETON

de la urbo SAINT-MALO en Esperanto. Ĝi estas eldonata okaze de la fervojistaj esperantistoj, kiuj alvenos la urbon la 19-an de septembro.

La esperantogrupo en la urbo admonas nin skribi al s-ro Jean Damanne, Turistoficejo, 6 rue de l'Horloge, 22100 Dinan Bretonio, Francio, mendante libreton aŭ demandante pri ĝia aperigo.



Uno el la veteranoj en la Esperanta-klubo en Skövde, CARL-EWERTH GRAHN, forlasis nin. Li estis naskita en 1911 kaj fariĝis en siaj 20-dekaj jaroj esperantisto.

Börje Andersson

Fidela, multjara esperantisto KARL HÄRNQVIST, Vimmerby, forpasis 95-jaraĝa. Karl Härnqvist kaj lia edzino Greta partoprenis universalajn kongresojn, eĉ post lia atingo de tre respektinda aĝo.

Lennart Åberg

Ankaŭ forlasis nin: INGRID ROHDIN kaj HELGE CROONA ambaŭ el Skövde.

OPINIO



Det här är vår insändarspalt. Har du funderingar som angår Esperanto så skriv till oss.

ĈU NI VOLAS IRI POLLANDEN '87?

La preparado por la 100-jara jubileo de Esperanto estas, kiel konate, en plena marŝado. la plej grandiozan manifestacion oni ja intencas aranĝi en Varsovio, la naskiĝurbo mem de la lingvo. Tiu elekto povas ŝajni memevidenta; tamen mi estas certa, ke multaj esperantistoj samkiel mi sentas malemon esti invitita al lando, kie antaŭ nemultaj jaroj la provo krei "socialismon humanan" brutale kaj sange estis frakasata sub la kalkanumoj de la reganta partio. Mi ne dubas, ke la koncerna reĝimo arde deziras ke tiel grava internacia evento okazu en ĝia

lando – same kiel Hitler deziris eluzi la propagandeblocojn de la Berlinaj Olimpikoj en 1936. Sed ĉu ni vere akceptas kontribui al la respektindigo de reĝimo, kiu faris la senekzemplan agon deklari militon kontraŭ la propra popolo? Eble estas ankoraŭ tempo sufiĉa por transloki la kongresegon en neŭtralan ŝtaton, prefere Svislando, kiu havas glorajn internacimovadajn tradiciojn kaj kiu estas ne malgrava provinco en Esperantujo.

Dixi et salvavi
animam meam
Ebbe Vilborg



Anna kaj mi gajigas homojn

daŭrigo

2

Kristin kompreneble iom gajigis vidante nin, sed eble ŝi miris, ke ni ne kunportis ion por ŝi en korbo. Tion ni ja kutimas. Sed ni pensis, ke certe ŝi fariĝos tre gaja, se ni nur kantos.

— Ĉu ni kantu iom por vi, Kristin? mi diris.

— Kanti? diris Kristin, kaj aspektis surprizita. Kial?

— Por ke vi estu gaja, diris Anna.

Ho, tiel, jes kompreneble, kantu vi, diris Kristin.

Kaj tiam ni ekkantis »Urbestro Munte» tiom verve ke eĥis en la domo. Kaj poste ni kantis »Norda vento severe volvas —», ĉiujn sep strofojn. Mi apenaŭ povis rimarki, ke Kristin aspektis pli gaja ol antaŭ nia kantado. Tial ni ankaŭ kantis »Adiaŭ, mia patro» kaj »Dormu, eta jun-salik!» kaj »En malata fiŝkaptista kabano» kaj ankoraŭ du aliajn kantojn, sed Kristin tute ne aspektis pli gaja pro tio. Anna kaj mi komencis preskaŭ raŭkiĝi, sed ni ne volis fini, antaŭ ol ni igis Kristin vere gaja, eĉ se tio estis tre peniga. Ni estis ĝuste ekkantantaj »Eta nigra Sara», sed tiam Kristin rampis el la lito kaj diris:

— Kantu vi, kiom ajn vi volas. Mi nur momente iros eksteren.

Sed tiam Anna kaj mi opiniis, ke ne havas sencon plue daŭrigi, sed ni diris adiaŭ al Kristin.

— Eble ni sukcesos pli bone, se ni donos florojn al iu, kiu ne kutime ricevas florojn, diris Anna.

Ni ĝuste estis pripensantaj, al kiu ni povus doni florojn, kiam ni

ekvidis ke Oskar, nia servisto, iras en la brutejon hejme. Ni alkuris lin, kaj mi diris:

— Oskar, ĉu vi iam ricevis florojn?

— Ho ne, mi ankoraŭ ne mortis, diris Oskar.

Kompatindulo, li verŝajne kredis, ke oni nur povas ricevi florojn je sia enteriĝo. Anna rigardis al mi kaj aspektis tute ravita, pri tio ke ni jam estis trovintaj iun, kiu neniam ricevis florojn. Kaj ni tuj kuris al la Nordbiena bosko kaj plukis bukedon da erikofloroj. Estis vere bela bukedo, kaj ni kunprenis ĝin en la brutejon. Tie iris Oskar kun sia puŝĉareto kaj transportis sterkon al la sterkejo, kiu estas tuj malantaŭ la brutejo.

— Jen, Oskar, vi ricevas florojn, ni diris kaj etendis al li la bukedon.

Komence Oskar kredis, ke ni ŝercmokas lin, kaj li ne volis akcepti la bukedon, sed ni diris, ke li devas preni ĝin, kaj tiam li faris tion. Momenton poste, kiam Anna kaj mi serĉis forkurintan kuniklon, ni preterpasis la sterkejon. Kaj tie kuŝis la florbukedo de Oskar.

— Mi komencas kredi, ke nia instruistino ne pravas koncerne tiun ĉi aferon, diris Anna.

Ni decidis ne plu klopodi gajigi homojn. Sed poste en la posttagmezo, kiam Anna kaj mi venis en la kuirejon, sidis tie viro sur seĝo kaj aspektis naiva. Svensson en Stubbenäset estas lia nomo. Li volis aĉeti porkon de ni, kaj Lasse kaj Bosse estis elkurintaj por venigi paĉjon, kiu estis okupita pri plugado en la granda

kampo. Dume Svensson atendis en nia kuirejo. Anna tiris min en angulon kaj flustris:

— Ĉu ne ŝajnas al vi, ke li aspektas hontema kaj embarasita? Ĉu ni tamen provu ankoraŭfoje? Paroli kun li kaj vigligi lin, kiel ja diris nia instruistino, vi scias.

Kaj ni decidis fari tion. Kutime Anna kaj mi povas babili kiom ajn, sed nu, kiam ni volis gajigi Svensson, estis tute maleble por ni trovi ion por diri. Mi cerbumis kaj cerbumis, kaj fine mi diris:

— Estas bela vetero hodiaŭ.

Svensson ne respondis. Tiam mi faris novan provon.

— Estas bela vetero hodiaŭ, mi diris.

Jes, diris Svensson.

Poste fariĝis tute silente. Momenton poste mi diris:

— Estis bela vetero ankaŭ hieraŭ.

— Jes, jes, diris Svensson.

Mi rigardis al Anna, ĉar mi opiniis, ke ŝi ankaŭ povis kunhelpi iom. Kaj tiam diris Anna:

— Ni esperu, ke ankaŭ morgaŭ estos bela vetero.

— Jes ja, diris Svensson.

Ĝuste tiam aperis paĉjo sur la korto, kaj Svensson ekstaris kaj foriris. Sed jen veninte ekster la pordo li sin turnis, montris ridaĉantan vizaĝon kaj diris:

— Kia vetero estis antaŭhieraŭ?

— Eble ni tamen iomete gajigis lin, diris Anna poste.

daŭrigas →

daŭrigo

— Estas eble, mi diris. Sed nun estu fino. Mi ne plu intencas igi homon gaja.

Sed tion mi tamen faris. Kaj ankaŭ Anna. Ĉar la sekvantan tagon la instuistino rakontis, ke knabino en nia klaso, kiu nomiĝas Märta, ne revenos al la lernejo dum longa tempo. Ŝi havas vere severan malsanon kaj devos kuŝi en sia lito plurajn monatojn. En la vespero, antaŭ ol mi ekdormis, mi pensis pri Märta, kaj tiam mi decidis doni al ŝi Bellan, kiu estas mia plej bela kaj kara pupo. Ĉar mi sciis, ke Märta tute ne havas ludilojn.

En la mateno mi rakontis al Anna, ke mi intencas doni al Märta mian pupon, kaj tiam Anna iris por alporti sian plej bonan fabelolibron. Post la lecionoj ni kuris al la hejmo de Märta. Ŝi kuŝis en la lito kaj estis tre pala. Kaj neniam mi vidis homon, kiu fariĝis tiom gaja, kiom Märta fariĝis, kiam ni metis Bellan kaj la fabelolibron sur ŝian kovrilon kaj diris, ke ŝi ricevas ilin. Ho, ho, ho kiom ŝi ĝojis! Ŝi premis Bellan kaj la fabelolibron kaj nur ridis. Kaj ŝi vokis sian patrinon, por ke ŝi venu kaj rigardu.

Kiam ni venis ekster la pordon, mi diris al Anna:

— Ne, nun ni ja gajigis homon, kvankam ni tute ne pensis pri tio.

Kaj Anna iĝis surprizita kaj diris:

— Jes ja.

Kaj poste ŝi diris:

— Certe estis prave, ke ni ne komencis kanti por Märta. Ĉar mi persone kredas, ke homoj fariĝas pli gajaj, kiam ili ricevas pupojn kaj librojn.

— Jes, almenaŭ infanoj, mi diris.

Tradukis Runo Stridell

KORESPONDPEŬO

ANDREO SOCHACKI

ul. Langiewiczza 15/20

28-200 Staszow

Polando

Li havas 29 j, estas teknikisto en kemia fabriko kaj havas edzinon kaj du infanojn.

MARIE HOTOVA

ul. Dacicke'ho 569

CS-734-01 Karvina4 Raj

Ĉeĥoslovakio

Ŝi estas 24-jara frau'lino. Intereso: literaturo kaj naturo.

STANISLAV KAREŠ

Tylovev 1262

508 01 Horiĉe

okres Jicin

Ĉeĥoslovakio

Li estas 39 jara agronomo-plantkuracisto.

Intereso: Agrikulturo, ĝardenado, naturo, naturprotektado, abelbredado, geografio, esperantomovado, sporto, fotografado.

HEGYI GYLILA

Szeged

Lenin krt. 36-38

11. Lcs. 111. em.2

6720

Hungario

deziras korespondi pri muziko, literaturo, turismo, naturo kaj volus scii, kiel vivas la svedaj junuloj. Li estas 21-jara studento.

JERAY KAPRIAK

26-600 Radom

ul. Natolinska 1/3 m 50

Polando

deziras korespondi kun svedoj por pli bone konatiĝi kun nia lando. Li havas 24-jarojn kaj laboras en tajpila fabriko. Kaj interesigas pri muziko kaj literaturo.

ELIZABETH MISKACZI

Kecsk Emét

Akadémia krt. 32. V/42

6000 Hungario

deziras korespondi kun knabo(j).

Ŝi estas 12,5 jara.

MARGARETA STROMBERG

Box 2004

S-871 02 Härnösand

deziras korespondi kun la tuta mondo kaj havas grandan interenson por lingvo, muziko, kudrolibro, legado kaj bestoj.

VALENTINA G TODOROVA

Kan "Nadejda

Bl. 317 v 4, ap 80

Sofia 1229

Bulgario

deziras korespondi kun gesvedoj.

Kieto-Kialanda, c/o Nkunku-Bazenga-Di-Mambueni, B.P.11.807, Kinŝasoi, Zairio — sinjoro kiu komencis lerni esperanton antaŭ unu jaron.

LUKSEMBURGA TELEVIDO

Je la fino de 1985, RTL/Luksemburga Televido/elsendos per satelito kaj eblos kapti ĝiajn programojn en dudeko da eŭropaj landoj.

Nun la estontaj programeroj estas pritraktataj.

Sekve estas tempo por Senprokraste kaj Amase sugesti al la RTL-estraro regulan programeron ankaŭ en Esperanto. ĉu monate. ĉu eĉ semajne.

Senprokraste ĉar estos tro malfrue. kiam la programeroj estos elektitaj.

Amase ĉar nur multnombra reago povos influi decidon. Ni ne forgesu, ke televida programo ne indas por deko da personoj.

Bonvolu proponi tion afable per individua aŭ per kolektiva letereto, kiun ankaŭ amikoj de Esperanto povos subskribi. Uzu preferinde la francan, germanan aŭ anglan (eĉ malbone); tamen bonvenos leteroj skribitaj ankaŭ en aliaj eŭropaj lingvoj.

Niaj leteroj inundu la labortablon de la RTL-Direktoro, Villa Louvigny, Luxembourg